

Christian Morgenstern,  
Begegnung

Wir saßen an zwei Tischen - wo? - im All ...  
Was Schenke, Stadt, Land, Stern - was tut's dazu!  
Wir saßen irgendwo im Reich des Lebens ...  
Wir saßen an zwei Tischen, hier und dort.

Und meine Seele brannte: Fremdes Mädchen,  
wenn ich in deine Augen dichten dürfte -  
wenn dieser königliche Mund mich lohnte -  
und diese königliche Hand mich krönte -!

Und deine Seele brannte: Fremder Jüngling,  
wer bist du, dass du mich so tief erregest -  
dass ich die Knie dir umfassen möchte -  
und sagen nichts als: Liebster, Liebster, Liebster -!

Und unsre Seelen schlugen fast zusammen.  
Doch jeder blieb an seinem starren Tisch -  
und stand zuletzt mit denen um ihn auf -  
und ging hinaus - und sahn uns nimmermehr.

...

Christian Morgenstern,  
Renkonto

*tradukita de Willy Nüesch*

Ni sidis ĉe du tabloj - lok'? - en mond'...  
Trinkejo, urb', land', stel' - ne gravas ja!  
Ni sidis ie en la vivoregno...  
Ĉe tabla duo, tie ĉi kaj tie.

Kaj brulis mia kor': Knabino fremda,  
se mi en ĉi okulojn versi rajtus -  
se rekompencus min ĉi reĝa bušo -  
kaj se ĉi tiu reĝa man' min kronus - !

Kaj brulis via kor': Junulo fremda,  
pro kio vi profunde min ekscitas -  
ke mi genuojn viajn amus braki -  
kaj diri sole: Kara, kara, kara - !

Kaj niaj koroj preskaŭ kunbatiĝis.  
Sed ĉiu restis ĉe l' rigida tablo -  
kaj fine ni nin levis kun l' aliaj -  
eliris - kaj nin plu neniam vidis.

...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 – †1914-03-31).*

*Arg-125-244 (2004-02-01 11:01:43)*

*Die von Herrn Willy Nüesch verfasste Übersetzung ist in der internationalen Literaturzeitschrift “Fonto”, Nr. 274 vom Oktober 2003, erschienen.*

*Traduko de la Germana poemo “Begegnung” de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, \*1927-05-09).*

*Arg-125-245 (2013-08-28 18:40:08)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresajon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo “Fonto” n-ro 274 en Oktobro 2003.*